

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## POBRA HUMANITAT

---

A l'entorn de la qüestió d'un idioma internacional mantes vegades s'ha parlat en periòdics que es creuen tenir cara i ulls i mantes vegades s'ha parlat d'una manera que palesava la ignorància que de la qüestió en tenia el que gosava tractar-lo, arribant al cas de dir que aprendre l'Esperanto és un entreteniment com col·leccionar cap-i-cues.

Quants són els que fan un somriure en trobar-se amb un esperantista. Quants són els que a causa de les diatribes d'un Andrenio, posem per cas, pensen que tractar amb un esperantista o bé amb qualsevol idealista és igual que tractar amb un beneit. I és que avui per avui es fa més cas d'un que marqui el *charleston* i vesteixi *oxford* que d'un home que raonadament defensi una teoria de progrés.

La humanitat, malgrat els seus vint segles, viu més endarrerida, dintre certs ordres, que les bèsties més bèsties. Presenteu-li qualsevol qüestió de valor positiu, presenteu-li qualsevol problema de progrés verament cultural i s'us tombarà d'esquena. Vivim un temps exemplar: de la còssa, del cop de puny i de la gran gatzara.

Malgrat l'espectacle desencoratjador, un petit nombre d'homes, plens de bona fe, amb sacrifici de vides alguns d'ells, lluiten entre les burles dels més, per les idees nobles, alts ideals, fites glorioses.

Que se'ns titlli de maniàtics o de grillats, tant se'ns en doni. Pobra humanitat, aixeca el cap cot que la vergonya t'empeny i escolta els que vertaderament volen fer-te un cel real de la terra!

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
 Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj.  
 Federacia sidejo kaj redaktejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
 Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca  
*Empordana Ebenajo*  
 (Girona) Armentera  
*Esperanta Nesto*  
 (Joventut Católica) Ripollet  
*Frateco*  
 Placo Pi i Margall, 14. Vendrell  
*Ĝerona Espero*  
 (Creu Roja) Girona  
*Lumon*  
 St. Antoni, 64. Terrassa  
*Studenta Juneco*  
 (Seminari) Girona  
*Aplec*  
 Mendizábal, 3. Sabadell  
*Bela Espero*  
 Carretera de Vich, 41. Manresa  
*Esperanta Idealo*  
 Mossèn Verdaguier Sta. Coloma Farnés  
*Esperantista Amikeco*  
 Plaça Bernardí, 10. Manlleu  
*Esperanta Burgono*  
 (Centre Democràtic) Rubí  
*Internacia Frateco*  
 (Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet  
*Paco kaj Amo (Soc.)*  
 Planeta, 16, pral. Barcelona  
*Barcelona Stelo*  
 Marquès Duero, 101. Barcelona  
*Barcelona Esperanto-Societo*  
 Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona  
*Esperantista Grupo «Sollerica»* Soller

*Artés:* Sro. Manuel Monrós  
*Armentera:* Empordana Ebenajo  
*Banyoles:* Sro. Joan Aulina  
*Figueres:* Sro. Carles Varela  
*Girona:* Sro. Josep M-a Dalmau  
*La Garriga:* Sro. Joan Blancafort  
*Mahó:* Sro. S. Ortega Barceló  
*Manlleu:* Sro. Marian Vilardell  
*Manresa:* Sro. Josep Albagés  
*Mataró:* Sro. Francesc Torres  
*Motins de Rei:* Sro. A. Canals  
*Monistrol de Montserrat:* Sro. F. Orobitg, Pastro  
*Palafrugell:* Sro. Francesc Sagrera  
*Palau de Montagut:* Fino. Lluís Bargés  
*Palma de Mallorca:* Sro. Narcís Bofill  
*Reus:* Sro. Enric Aguadé  
*Ripollet:* Sro. Josep Planas, Pastro  
*Rubí:* Sro. Joan Ratés  
*Sabadell:* Sro. J. Comadran  
*St. Adrià del Besòs:* Sro. S. Arnella  
*St. Martí Sapresa:* Sro. Joan Rieradevall  
*Sta. Coloma de Farnés:* Sro. Pere Costa  
*Sta. Coloma de Gramanet:* Internacia Frateco  
*Sallent:* Sro. Lluís Solé  
*Sóller:* Sro. M. Arbona  
*St. Felú de Pallarols:* Sro. J. Collelldevall  
*Terrassa:* Sro. Ramon Marsà  
*Teyà:* Dro. Jacint Barrera  
*Vendrell:* Fino, Maria Julivert  
*Vich:* Sro. Pere Farrés  
*Vidres:* Sro. Josep Macià  
*Vilanova i Geltrú:* Sro. Jaume Fort  
*Vilassar de Mar:* Sro. Pere Domènech

### LOKAJ-DELEGITOJ

*Ager:* Fino. Maria Plans  
*Almúnia de Castellví:* Sro. Pere Esvertit  
*Ametlla de Merola:* Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gitaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÉ

Redaktoroj: Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

## Fidele ni laboru (1)

Ĉu vi ĝuste povas kompreni kia emocio estas en mi ĉe la starigo kontraŭ la mikrofono? Jen mi, sola en tiu ĉi ĉambro serioza kaj impona, alparolas la nevideblon. Mia penso flugas for kun la misteraj ondoj, al la amikoj transmaraj, al la samlandanoj. Kiu aŭskultas min? Certe multaj amikoj, certe kelkaj malamikoj. Se niaj malamikoj devus ĉeesti niajn publikajn kunvenojn por esplori la sincerecon de nia esperantismo, certe ili ne venus. Dank' al radio, nia penso, la vivo de nia parolo, mistere flugas al la hejmo de ĉiu homo kaj oni libere aŭskultas nin. Ho! kia feliĉo por la esperantistaro se nia neforgesebla majstro estus ĝisvivinta la nunan epokon. Kia plezuro por la paca batalantaro, se la varma parolo de nia kara Zamenhof, de tempo al tempo venus al ni el la malproksimo kaj donus al ni la grandan instigon de liaj grandaj pensoj, havigus al la diverslandaj defendantoj de la sankta afero, tiun ĉarman fajron de internacia frateco kaj sincera amo.

Mi ne povas preterlasi tiun ĉi unuan okazon de mia spirita konatiĝo kun multaj esperantistoj el diversaj landoj, por laŭte diskonigi la fervoron kaj entuziasmon de la katalunaj esperantistoj por la verko de Zamenhof kaj, precipe, por la animo de tiu verko, por la vera esperantismo.

Se ni volas ĉerpi el la propagando de Esperanto sanan frukton, ni ne

(1) Ideoj ĉerpitaj el parolado disaŭdigita de la verkinto pere de Radio-Barcelona, la 16 junio.

devas devojiĝi, ni ne devas forlasi la vojon montritan de Zamenhof, la vojon, kiun, ŝajne, en kelkaj lokoj, oni facile forgesas.

Al vi, karaj samideanoj enlandaj, kiujn ne por la unua fojo mi alparolas, mi devas ripeti hodiaŭ, ke la lingva fideleco estas io eksterordinare grava por nia movado, sed, super tiu fideleco, pri kiu ni ĉiam montris grandan respekton kaj atenton en nia organo Kataluna Esperantisto, staras tiu fideleco al la spirito de nia movado. Prave deklaras la Bulonja deklario, ke esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas Esperanton por kiu ajn celo, sed ĉiuj niaj pensoj, ĉiuj niaj oferoj, serĉas rekompencan ne en tio ke la lingvo internacia trovas adeptojn ĉe komercistaj rondoj, unuvorte, ĉe praktikaj homoj, sed en tio ke la paca ideo de toleremo kaj respekto inter homoj el diversaj landoj kaj lingvoj, varbas novajn defendantojn, novajn batalantojn. Por tiu amo, kiun la majstro inokulis en sian verkon, por tiu mistika parfumo, kiun disradias nia himno, ni konstante batalas, ni konstante nin elmetas al moko kaj atakoj.

Kelkaj lecionoj sufiĉas por lerni la mekanismon de la lingvo, kelkaj homoj povas sufiĉi por konatiĝi kun la dek-ses reguloj de la gramatiko de Esperanto, sed por eniri, por asimili la internan ideon de la Zamenhofa verko, oni pli longe devas kunvivi nian movadon. Al la gvidantoj de kursoj, al la estrantoj de esperantistaj grupoj, ni turnu nin ĉiam kun la *admono*: ju pli multe vi predikos la internan ideon de Esperanto, des pli da bono vi semos por la estonta homaro.

Povas esti, ke la triumfo de Esperanto kiel lingvo internacia, sukcesos en baldaŭa tempo kaj ke la efektiviĝo de tiu interna ideo venos nur post pli longa tempo, sed ĉu pro tio ni devas forlasi tiun kaŝitan ĉefan enhavon de nia afero?

Ŝajnas al mi, ke pensema homo facile konsentos, ke oni devus nei al la homaro eĉ plej malgrandan porcion de racio, se kio estas logika, kio esence estas vera kaj *natura*, en la estonto ne trovos plenan efektiviĝon. Sekve, estas tre logike aserti, ke Esperanto iam plene sukcesos ĉar, ĉu estas io kontraŭnatura tio ke ĉiuj homoj en la mondo facile povas interkompreniĝi? Ne. Pli miriga ol tiu estonta triumfo de lingvo internacia estas la fakto ke tiel longa tempo pasis en la mondo — erare nomata civilizita — kaj ke tiu natura postulo ne efektiviĝis jam.

Ankaŭ al tiu sama ordo de ideoj apartenas la interna ideo de Esperanto. Ĉu la homaro vivos en konstanta batalo fratmortiga? Ĉu eterne frato fraton atakos ŝakale? Ne, tute ne. Tiu malnobla agado estas kontraŭnatura kaj nedubeble ĉio, kio kontraŭstaras la leĝojn de la naturo, iam falos por eterne.

Eĉ sen apostoloj de tiuj pacaj ideoj, eĉ sen la viktimoj kiuj falas dispremitaj de antaŭjuĝoj, la idealoj kiuj apartenas al la moralo universala, per si mem trabatus al si vojon kaj iam venkus.

Seni havas antaŭ ni tiel belan perspektivon, se ni havas tiun intiman konvinkon, ke ni ne batalas por utopio, ĉu ni povas halti en la batalo? Ne, mi!



fojojn ne. Ni, pioniroj harditaj en la longa vojirado al la celo, neniam haltos en la kantado de la sankta ideo.

Ni heredis de la kreinto de nia ideala mondo la ĉarmon de la plej alta homsento, kaj pro tio pulsas en ni la tuta forto de la pura vero, el kiu ni ĉerpas energion por la konstanta antaŭenirado.

Vere, bedaŭrinde, ni ne ĉiam vidas amikajn manojn. La katalunaj esperantistoj iafoje vidas, ke suspekto flugas ĉirkaŭ ilia tendaro. Ĉu ni eraras la vojon montritan de la paŝtisto? Ĉu nia agado ne akordiĝas kun la postuloj de esperantismo? Ni estas konvinkitaj, ke ni ne eraras, kaj ankaŭ estas konvinkitaj ke niaj kritikantoj, iafoje tro atakemaj, intermiksas Esperanton kun aferoj pure privataj, plene subjektivaj.

Zamenhof diris okaze de la unua kongreso en Bulonjo-sur-maro: «en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiaj kaj senprivilegiaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio».

Konstante ni rememoru tiun fragmenton el la unua parolado de la majstro. Plej bone ni iros nian vojon, se ni surpaŝos liajn postésignojn. Plej bone kaj rapide progresos nia afero, se ni ne forgesos liajn instruojn.

Ni restu fidelaj al la interna ideo de Esperanto. Ni gardu ĝin en la koro. Nia agado ĉie kaj ĉiam estu inspirita de tiu sankta beno. Nur tiel ni estos indaj je la nomo de spiritaĵoj de la plej genia homo de la zamenhova generacio.

Fidele ni laboru!

S. ALBERICH JOFRE



## XVIII<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto

Edinburgo 31 Julio — 7 Aŭgusto

Relative multaj katalunoj veturis al la malnova kaj bela ĉefurbo de Skotlando por partopreni tiun ĉi kongreson: Gesinjoroj Comellas el Vich, S-ro Jaime Grau Casas el Barcelono, F-ino C. Dalmases, mia edzino kaj mi mem el Terrasa; kune ni entreprenis la vojaĝon. Karaj amikoj adiaŭis nin en la Barcelona stacidomo, kaj nia karavano kun ĝoja koro tra Parizo kaj Londono venis sabaton la 31-an de Julio en Edinburgon. La unua ekvido de la skota urbo estis plej ĉarma kaj mi pensas ke mi neniam forgesos la belajn, en tiuj tagoj de la suno karesatajn, ĝardenojn en Princess Street. Post trarigardo de niaj ĉambroj en la pensionejo ni turnis nin al la kongresejo, alte lokita kaj severa palaco, kie flirtis la nacia kaj la verda standardoj,

videblaj el la tuta urbo. Kiel decas al sudanoj en norda lando, ni malfruis kaj trovis ĉiujn kongresanojn kunvenintaj en la granda festsalono por la interkonatiĝa vespero: diversaj gesinjoroj, pri kies nomo, mi petas pardonon, mi ne memoras, deklamis versaĵojn kaj kantis, kaj ankaŭ ofte kantis la tuta ĉeestantaro: oni devas diri ke la kunkantado estis unu el la ĉefaj trajtoj de tiu kongreso kaj por tio la Komitato tre saĝe eldonis kantolibron vere riĉan de melodioj. Post la fino de la festo ĉiuj vizitis en apuda ĉambrego la vendejon de libroj kaj memoraĵoj de Edinburgo, la akceptejon kaj sekretariejon tre orde aranĝitajn, la poŝtejon kaj monŝanĝejon kaj precipe superŝtitaj de samideanoj estis la skribotabloj, kiuj ne ripozis en la tuta daŭro de la kongreso kaj faciligis al ĉiuj la agrablan taskon dissendi poŝtkartojn al konatoj kaj parencoj, kio estas nemalgranda enspezo por la ŝtato kie okazas vasta kongreso. Multe da samideanoj, precipe karaj kaj konataj de la katalunoj, ni havis la plezuron saluti, inter ili F-ino L. Briggs, S-inoj Osmond kaj Grogan, S-ro Kreuz kaj aliaj de mi persone konataj. Multaj parolis al ni pri nia Antologio kaj estis tre kontentaj havi la okazon saluti ĝian kompilianton Jaime Grau Casas. La kongreso ĝoje kaj bele komencis.

Dimanĉon la 1-an de Aŭgusto, bela vetero; agrabla konato nia, la suno, nin salutas jam matene. Ni eliras al la strato kaj stranga kvieteco nin surprizas: aŭtomobilojn kaj tramojn oni ne vidas: estas dimanĉa ripozo kaj ĝis la deka matene ili ne deĵoras. Nia unua provo konstati ke oni povas senpage veturi nur montrante la kongresinsignon ne sukcesis pro manko da veturiloj; ni do piede nin turnis al la malnova Katedralo S-ta Giles kie okazis la esperanta diservo: unu el la plej rememorindaj okazaĵoj de la kongreso: kiel agrable sonis la esperantaj paroloj inter tiuj severaj, maljunaj muroj! Tute plena la preĝejo de diversnaciaj homoj, oni festis unue la aperon de la traduko de la Biblio en Esperanta lingvo, diversaj pastroj, ĉiuj esperantistoj, legis tekstojn el la Biblio kaj Pastro D-ro G. Bailey faris tre elokventan kaj klaran predikon en Esperanta lingvo. La Ĥoristaro de la Katedralo, sub la direktado de S-ro Greenhouse, kantis kelkajn belajn psalmojn kaj himnojn, kaj precipe ĉarmis nin per la kantado de la tutmonde konata Haleluja de Handel, kiun ili kantis vere arte kaj harmonie.

Elŝirinte el la diservo, per diversaj tramoj, ĉiuj kongresanoj veturis al la Skota Zoologia Parko, kie oni povas facile kaj sen laciĝo pasigi agrablan posttagmezon. Komuna lunĉo okazis en la restoracio kaj poste ĉiuj libere promenis kaj trarigardis la diversajn bestojn, kiuj tiel abundas en la parko. Agrable estas vidi sovaĝajn bestojn, kiuj ne estas gardataj en kaĝo, sed kvazaŭ en stato de libereco. Post trarigardo de la Parko kaj agrabla babilado kun eksterlandaj esperantistoj ni veturis denove en la urbon kaj iom ripozis sur la mola herbo en la koro mem de la urbo, sub la ŝirmo de la fiera kaj malnova kastelo de la estintaj skotaj reĝoj.

Vespere en Synod Hall okazis la unua Koncerto aranĝita de la Komitato, kiun prezidis S-ro Merchant: agrablaj kantoj, deklamoj kaj komuna kan-

tado plenigis la programon, kiu estis nur antaŭanonco de pli belaj vesperoj.

Lundon matene je la deka malfermiĝis la Kongreso en la granda fest-salono de la Kongresejo; milo da kongresanoj, el kvardek diversaj landoj, sidas en la ĉambro, flagoj el multaj diversaj nacioj pendas en la galerioj. Oni kantas nian himnon, ĉiuj stariĝas kaj oni rimarkas en ĉiuj vizaĝoj la emociion, kiun la vortoj de Zamenhof ĉiam vekas en la koroj de ĝiaj fideluloj. Oni sciigas ke D-ro Privat pro malsano ne povis veturi al Edinburgo kaj S-ino Isbrucker, en la nomo de Centra Komitato proponas la nomojn de la estraro: S-ro Page, el la loka komitato estas aklande elektita kiel Prezidanto de la Kongreso kaj S-roj R. Kreuz kaj Butler kiel Sekretarioj, kiel Vicprezidantoj estas elektitaj aliaj personoj, kies nomojn, vi povos legi en la Oficiala Raporto. S-ro Page akceptas la prezidan postenon kaj faris tre belan paroladon: li salutis unue la filinojn de D-ro Zamenhof, kiuj venis al nia Kongreso, kaj laŭ sprita maniero faris la laŭdon de la skotoj kaj deziris al la eksterlandanoj plej koran bonvenon al Skotlando. Poste salutis la Kongreson la reprezentantoj de la registaroj kaj tiuj de la internaciaj societoj kiuj aliĝis al ĝi kaj fine la reprezentantoj de la diversaj landoj kaj lingvoj en la mondo uzataj: mi mem parolis en la nomo de la katalunoj, kaj la fakto ke tio ĉi naskis nenian disputon montras tute klare ke en aliaj okazoj la malfacilaĵoj estis simple afero de iu privata persono, kaj ke sufiĉas ke tiu persono ne ĉeestu la kongreson por ke nia rajto estu sendiskute akceptata de ĉiuj. Estas bedaŭrinde ke multaj delegitoj venas al la podiumo kun antaŭlernita parolado kaj malgrŭ malpermeso de la prezidanto de la Kongreso pretendas paroli pli ol unu minuton: ĉu ili ne komprenas ke tre longa parolo lacigus ĉiujn, precipe se tio estas en la fino de la kunsido? Ĝoje estas tamen aŭdi nian lingvon parolatan de tiel multaj diverslingvanoj kaj konstati kiel facile ĉiu estas komprenata. Kun tiu ĝoja sento en la koro ĉiuj forlasas la ĉambregon post fino de la kunsido kaj ni kun kelkaj amikoj malnovaj kaj novaj amikoj tie akiritaj marŝas al la magazenoj Patrick Thomson, en kies restoracio svarmas la kongresanoj, ĉar tie oni mangas malkare kaj bone kaj en ĉiuj tabloj oni havas la menuon en esperanta lingvo.

Je la dua kaj duono okazas la Malfermo de internacia Somera Universitato. Anstataŭ D-ro Privat, kiu ne povis veni al la Kongreso, Profesoro Bouvet el Ĝenevo faris la malferman paroladon. Je la tria Prof. Cart el Parizo, la simpatia Prezidanto de nia Akademio, faris tre interesan prelegon pri la Franca Folkloro kaj Popolkanto, kiun ĉeestis grandnombra publiko. Je la kvara Prof. Bujwid el Varsovio faris prelegon pri Homo kaj Mikroboj, kiu eble pro la specialeco de la temo ne interesigis multajn personojn: tamen oni kun granda atento aŭskultis la klarigojn. Eble estas oportune nun fari kelkajn rimarkojn pri la somera Universitato, kiun oni devus atenti en aliaj kongresoj, se oni volas ke la prelegoj estu interesaj: mi persone preferus, ke la prelegoj estu pure teknikaj paroladoj, ĉar se ili estas vulgarigaj prelegoj tiam la afero estas tia, la fakuloj enuas ĉar ili trovas en la parolado nenion novaĵon indan de aŭskultado

kaj la nefakuloj enuas ankoraŭ pli ĉar estas tute neeble per unu sola parolado kaj en mallonga tempo enkonduki personon en la komprenon de unu scienco aŭ fako; krom tio oni komprenu ke la kongreso okazas en somero kaj ke la tria posttagmeze en neniu eŭropa lando estas taŭga horo por aŭskulti prelegon kaj tial oni povas vidi personojn, kiuj tute kontraŭ sia volo endormetiĝas.

Vespere je la 8<sup>a</sup> la Urbeŝtraro en ceremonia kostumo kaj kun granda pompo akceptis la kongresanojn en Art-Lernejo Lauriston: Lia Moŝto la Urbeŝtro kaj lia edzino premis la manon al ĉiu kongresano, kiu vice venis unu post la alia kaj samtempe donis sian vizitkarton al urbeŝtrara oficisto. La Urbeŝtraro regalis la kongresanojn per bela koncerto kaj per bufedo abundega.

Mardon 3<sup>a</sup> de Aŭgusto je la naŭa matene, sur la herbo-tapiŝo en la ĝardeno kuŝanta antaŭ la kongresejo staris ĉiuj kongresanoj por komuna fotografado. Post tio okazis la Unua Laborkunsido, en kiu oni diskutis kaj aprobis la raportojn de la Internacia Centra Komitato, de la Universala Esperanto-Asocio kaj de la prezidanto de la Akademio. La detalan raporton bonvolu legi en la oficialaj dokumentoj. Kun kelkaj amikoj ni havis ankoraŭ tempon viziti la malnovan kastelon, kiu tiel fiere superstaras kaj gardas la urbon, kaj la palacon en Holyrood kie loĝis la skotaj reĝoj. Posttagmeze S-ro Ĉe faris paroladon pri «La rekta metodo en la instruado de Esperanto» kaj S-ro Deuel pri «La modernaj sukcesoj en la Terapio de Ftizo», pri kiu mi ne raportas ĉar tie ĉi ne estas la oportuna loko. S-ro. Tarelli parolis ankoraŭ pri la Internacia Laboroficejo kaj S-ro Orenge pri la Suno, agrabla parolado ilustrita kun lumbiloj kaj kiun ĉeestis multaj personoj.

Vespere je la 7<sup>a</sup> kaj duono en Synod Hall okazis la Skota Koncerto. Kiel S-ro Page diris tiu ĉi koncerto anstataŭas la prelegon pri la skota folkloro, kiu mankas en la programo de la Kongreso: efektive ni aŭdis belajn malnovajn skotajn melodiojn, ludon de sakfajfiloj, koncerton de fiŝvendistinoj el Newhaven kaj malnovajn skotajn daŭcojn: tre interesis nin vidi militistan dancon tute similan al tiu de nia sufiĉe konata *Hereu Riera*. Entute tre bela vespero. Samtempe en la radiostacio en Edinburgo okazis paroladoj en Esperanto kaj kantoj en la sama lingvo, kiujn ankaŭ dissendis la potenca stacio en Daventry kaj sekve estis aŭdeblaj en aliaj landoj.

Merkredon 4-an de Aŭgusto matene okazis prelego de D-ro Fournier D'Albe pri Radio kaj ĝia Estonteco, de D-ro Deuel pri Plilongigo de la Homa Vivo kaj de S-ro Bennemann pri la Germana Folkloro kaj Popolkanto: tio estis bela koncerto efektive sed oni riproĉis al S-ro Bennemann ke li donis al la vorto popolkanto tro vastan sencon kantante kantojn de konataj aŭtoroj kaj ne pure popoldevenaj. Posttagmeze nova prelego de S-ro Ĉe pri sama temo kaj de D-ro Stromboli pri Elektrametalurgio en Italujo. Prelego de nia amiko S-ro Jaime Grau Casas pri la Kataluna Folkloro kaj Popolkanto: ni povis konstati ke nia lando estas efektive konata de la esperantistoj kaj ke tiu temo interesis multajn personojn; nia amiko Grau fa-



ris tre belan paroladon kun korekta lingvo kaj eleganta esprimmaniero, li deklamis la tekstojn de la kantoj kaj lia amiko kaj malnova korespondanto S-ro W, H. Staveley sur la piano ludis la diversajn melodiojn, kiuj tre multe plaĉis al la aŭskultanta publiko. Post la fino de la prelego multaj personoj petis informojn pri la Kataluna Antologio kaj aĉetis ĝin. S-ro Orengo samtempe faris sian duan prelegon pri La Suno. Vespere en Central Hall, vasta koncertejo okazis la plej bela koncerto, kiun ni aŭdis dum la kongreso: la «Glasgow Orpheus Choir», kiu mirinde kantas, dum du horoj regalas niajn orelojn per la jen mildaj, jen gajaj, skotaj melodioj: multe da meritaj aplaŭdoj kolektis la kantistoj kaj ilia talenta direktoro S-ro Robertson. La Loka Komitato eldonis broŝuron kun la teksto de la kantoj kaj ilia traduko en Esperanto, kio faris la kantojn multe pli ĝuindaj.

Ĵaŭdon la 5-an de Aŭgusto matene, en la Kaledonia Stacio du vagonaroj atendis la kongresanojn kaj kondukis ilin al Gourok, en la okeidenta parto de Skotlando, tie ili eniris en la ŝipojn, kiuj promeniĝis ilin tra la fjordoj de la rivero Clyde: la veturado estis tre agrabla kaj daŭris preskaŭ tutan tagon; ĉiumomente la aspekto de la bordoj ŝanĝiĝis kaj la rigardo neniam laciĝis. Certe tiu estas la plej bela parto de Skotlando. Fine la ŝipoj kondukis nin al Wemys Bay, kie denove la vagonaro prenis nin kaj portis nin al Edinburgo, kiun ni atingis je la naŭa vespere.

Vendredon la 6-an de Aŭgusto matene, okazis prelego de prof. Collinson pri Esperanto kiel vojo al Lingvoscienco, de S-ro Tarelli pri la Internacia Laboroficejo, de D-ro Olŝvanger pri Hebrea Folkloro, de S-ro Ĉe pri sama temo kiel lia antaŭa prelego kaj de S-ro Kornfeld pri la Pola Folkloro kaj Popolkanto. Posttagmeze nova parolado de Prof. Collinson pri la sama temo. La prelego de S-ro Mangada pri Hispana Folkloro ne okazis pro neĉeesto de la aŭtoro.

Vespere en la Palais de Danse, luksa dancejo en Edinburgo, okazis la Internacia Balo. La dancejo estis certe tre belaspekta, kaj multaj naciaj kostumoj pliiĝis ankoraŭ ĝian ĉarmon: oni dancis kun la laŭta muziko de la sakŝafistoj skotajn dancojn kaj amuze estis vidi la malfeliĉajn provojn de la eksterlandanoj en la dancado de la skotaj dancoj. Agrablaj ludoj de la lampoj, kiuj lumigis la salonon, faris tiun ankoraŭ pli alloga. La balo daŭris ĝis noktomezo, ĝuste ĝis la horo kiam ĉe ni oni ekdancas.

Sabaton la 6-an de Aŭgusto matene, okazis la Ferma Kunsido: venis jam la horo malgaja de la adiaŭo: oni prezentis al la kunsido la diversajn rezoluziojn de la fakaj kunvenoj kaj oni transiras al la dankoj por la Loka Komitato, kiu tre bone kaj kontentige aranĝis la kongreson, al S-ro Warden, kiu tiel multe laboris por la eldono de la Biblio, al la Urbeŝtraro, kiu tiel ĝentile akceptis la kongresanojn kaj al ĉiuj, kiuj iel helpis la sukceson de la Kongreso. S-ro Page en la nomo de la skotaj esperantistoj adiaŭas la kongresanojn kaj diras al ĉiuj: Ĝis la revido en Danzig! La muziko de nia himno La espero vibras en ĉiuj gorĝoj kaj nia 18<sup>a</sup> Kongreso estas finita.

Posttagmeze okazis ankoraŭ ekskurso al Forth-<sup>a</sup> Fonto, kiun ĉeestis

multaj samideanoj kaj atente aŭskultis la klarigojn, kiujn sinjoro inĝeniero faris pri la fama konstruaĵo. Vespere ni vespermanĝis kun la sola kataluno, kiu loĝas en Edinburgo S-ro Juriol; oni diras ke katalunojn oni renkontas ĉie en la mondo kaj tiun ĉi fojon ankoraŭ la diro estas prava. Dimanĉon matene, la morgaŭan tagon ni forveturis el Edinburgo. Mi devas speciale danki F-inon L. Briggs, kiu kun kelkaj samurbanoj bonvolis adiaŭi nin en la stacidomo kaj ankaŭ S-ron Juriol, kiu tiel same agis. La granda festo de la esperantistaro estas finita; por la propagando en Skotlando ĝi multe efikas, kiel ni povis tion konstati en la lokaj journaloj, kiuj ĉiutage okupis sin pri Esperanto. La kongresoj havas nur unu malagrablaĵon: ke ili lasas en niaj koroj tro fortan deziron denove revidi la urbojn kie ili okazis kaj la multajn amikojn, kiujn ni ne plu renkontos tie. — MARIAN SOLÀ

### Dimanĉe

Forpasas hor' post horo — horo senkonsola...  
 Knabino sidas sola.  
 Forbruas tram' kaj ree regas la silento...  
 Foliojn movas eta vento.  
 Doloras kor' en suna tago senlabora.  
 La urbo dormas, polvo ora  
 leviĝas jam pro tralastrata kuro  
 de l'buboj, de la ĉarveturo.  
 Ho, venu do, mistera dezirata  
 amik', fianĉo aŭ la frato,...

P. STOJAN

### La Nubeto

M. Lermontov

Nokton dormis nuboj ora  
 sur la brusto grizmarmora  
 de la rok' maljuna.  
 Frumatene ĝi sopiris  
 al libero, kaj foriris  
 antaŭ levo suna...  
 Malaperis gajludanta  
 en lazur' nubeto,  
 lasis ĝi sur brust' giganta  
 gutojn da pluveto...  
 Kaj maljuna sola roko,  
 en dezerta vea loko,  
 ploras en sekreto.

El la rusa tradukis

P. STOJAN

## La porcelana katino

Dediĉita al f-ino Roznikova el Odessa

Profesoro Irgen revenis hejmen post lekcio. Lin atendis malvarma ĉambro, la lasta, nedetranĉita ankoraŭ, numero de la «Matematika Revuo» kaj la malagrabla perspektivo de eventuala reveno de akraj podagraj doloroj.

Li estis malkontenta pri ĉio ĉi, sed precipe lin ĉagrenigis la ĵus tralegita lekcio. Certe, la plej pretendema kritikemulo ne trovus en ĝi iun riproĉindaĵon, kaj tamen... ĝi tute ne kontentigis la maljunan profesoron...

Jes, tio estis mirinde simpla kaj klara lekcio pri la komplikega tecrio de Hamilton'aj *kvaternioj*, sed profesoro Irgen, la iama profesoro Irgen, povus krei ion pli bonan!

Io mankis... Li sentis tion, serĉis, analizis... Ĉu maljuneco?...

Pligrandiginte la fajron en kameno, li sidigis sur apogseĝon kaj prenis la ĵurnalon. Oreflavaj rebriloj de la fajro oblikve lumigadis lian grizan, leon-similan hararon kaj saĝan altan frunton, ĵetante profundajn ombrojn sur la akrajn trajtojn de l' vizaĝo, kiu ŝajnis nun esti ankoraŭ pli serioza, pli severa kaj senpasia, ol iam ajn...

Per kutimaj rektliniaj movoj li detranĉis la ĵurnalkajeron kaj foliumante ĝin li trarigardis la enhavon.

«Pri kelkaj proprecoj de la surfacoj de Rieman», tralegis li la titolon de unu el la artikoloj. Kaj ĝia aŭtoro... «Edith Lorn».

Ĉu tio estis ombroludo? Aŭ efektive lia vizaĝo ekposedis alian aspekton? Ĉu transformigis en ĝi io krom la okuloj?... Sed la okuloj ŝanĝigis! En ili aperis fajrero, ne respegalanta la fajron de l' kameno, sed iel interne lumanta.

Kiel en *stroboskopo* en lia menso pasis aro da rapide variantaj bildoj.

Granda salono... Homamaso...

La suno mem per siaj lumradioj, penetrantaj tra la fenestregoj, salutas la unuan lecion de juna profesoro.

La diverskolora bruaro ĉesas, kiam li suriras katedron. Streĉite la studentaro atentas ĉiujn liajn movojn. Kviete li metas sian paperujon, prenas kretpecon kaj komencas per melodia nuanciĉa voĉo. Li parolas pri la konstanta variado en la naturo, pri la senĉesa evoluo de ĉio ekzistanta, pri la senfunda komplikeco de la naturfenomenoj kaj pri la akra, ĉion sekcianta metodo de matematika analizo... Kaj lia voĉo fluas, penetrante la animojn de ĉeestantoj, kunigante per nevideblaj fadenoj lian potencon cerbon kun cerboj de ĉiuj aŭskultantoj. Kaj iom post iom la nuda staturo de l' pura logiko estas kovrata per luksaj vestaĵoj de larĝaj ĝeneraligoj, per la perloj de brilaj analogioj.

La tuta figuro de l' juna lekciisto elradias la senton de l' certeco, de memkonfido, liaj geŝtoj estas samtempe noblaj kaj liberaj, kaj sole liaj

okuloj malkaŝas, ke tio estas lia unua lekcio; ili senĉese vagas tra la maro de sennombraj vizaĝoj, ili serĉas firman bazon en la milobla okulo de l' aŭdantaro. Kaj subite ankaŭ ili kvietiĝas, senmoviĝas, fiksiĝante al unu punkto. En dua vico sidas serioza studentino, kies rigardo hela kaj klara, raviĝite direktiĝas al la profesoro. La belaj molaj linioj de ŝia vizaĝo harmonias kun simpla, sed bongusta vestaĵo; la duone malfermita buŝo havas ĉarman infane-naivan aspekton. Profesoro Irgen trovis de li serĉitan bazon. Kaj nun lia parolo estas ankoraŭ pli emociiga, liaj esprimoj pli koloraj kaj la voĉo pli fleksebla. Jen li apenaŭ aŭdeble, streĉiĝante ĝis maksimumo la atenton de l' aŭdantaro, rakontas pri senfruktaj provoj de antikvaj matematikistoj, penintaj en konstantaj nombroj respeguligi la naturprocedojn. Kaj jen, pasante rapidan «crescendo'n», li per tondra voĉo nomas tiujn, kies potenca spirito solvis la problemon, kunfandinte la logikon kun la naturo per variantaj nombroj.

Li finas, citante la vortojn de Arthur Cayley: «... la progreso de l' matematiko estas grandioza, la kampo de ĝia agado — senlima, ĝia estonteco — plena de esperoj».

Uragano de aplaŭdoj kovras la eĥon de tiuj vortoj. Tiel oni aplaŭdas nur talentegan artiston, kiun oni dankas por la momentoj de aparta estetikaj ĝuo. Sed pli... multe pli, ol tiuj aplaŭdoj, ĝojigas la profesoron malgranda kristala larmo en okuloj de la serioza studentino.

Edith Lorn estas brilsukcesa studentino. Ŝiaj ekzamenoj plinombrigas la laŭrojn de l' juna, sed jam eminenta profesoro. Ŝia rigardo plivigligas lin dum la lekcionoj: li ne preparas ilin hejme, li kvazaŭ ĉerpas ilian enhavon el tiuj profundaj belaj okuloj.

Ŝi finas la studadon triumfplene kaj estas lasata ĉe la universitato kiel asistantino kaj aspirantino de la matematika katedro. Pli kaj pli ofte li renkontiĝas kun ŝi; la aferajn interparolojn penetras iom post iom pli intimaj temoj. Ŝi rakontas al li iafaje pri sia hejmo, pri sia malproksima patrujo...

Kaj unufoje post kunsido de l' profesorado ŝi deklaras al li. «Mi devas reveni patrujon... eble por ĉiam...» Ŝia voĉo sonas malĝoje.

Nokto sendorma... Nokto de pensoj decidigaj, malĝajaj...

Li sentas, ke ne estas eble resti sen ŝi, ke la vivo perdos por li tutan sian aromon, se ŝi forveturos. Kaj tamen... kial ŝi forveturas?

Certe, ŝi havas en sia patrujo fianĉon, kiun ŝi amas, pro kiu ŝi forlasos la scienccon... forlasos lin, sian profesoron, kiun ŝi tre estimas... sed ne...

Kaj lia potenca volo, lia akra racio venkas la senton.

Ŝi venas adiaŭ lin, danki lin. Li estas trankvila... eble tro trankvila. «Jes! Ŝi estis bonega lernantino. Li ĉiam fieris pri ŝi. Ŝi havas talenton. Li konsilas al ŝi daŭrigi... se eblas... la laboron». «Ŝi ankoraŭ unufoje dankas lin por ĉio kaj petas lin akcepti kiel memoraĵon tiun ĉi porcelanan katinon. Ŝi tre ŝatas katinojn, do li bonvolu pardoni al ŝi tian infanaĵon». Ŝi abrupte premas lian manon, turniĝas rapide, foriras...



Nur du tagojn la profesoro ne lekciis. Mallonga avizo sciigadis studentojn pri lia malsano. Kaj poste ĉio daŭris kiel antaŭe... aŭ preskaŭ tiel...

Nun ĉio finiĝis. Restis nur la malnova porcelana katino, mediteme la profesoron rigardanta de l' kameno, kaj la nova numero de l' ĵurnalo, enhavanta la nomon de Edith Lorn... «Lorn»! Neŝanĝite!!

Per tremantaj pro emocio manoj la profesoro kareseme prenis la katinon, sed ĝi elglitis, falis kaj rompiĝis. Inter pecoj da porcelano kuŝis flaviginta paperfolio. Li ĝin rapide kaptis, disfaldis kaj legis.

«Eble iam vi okaze rompos tiun ĉi porcelanaĵon. Vi estos, certe, jam forgesinta vian ekslernantinon Edith Lorn. Ŝi vin neniam forgesos...»

«En la tago de mia forveturo mi sentas nerezisteblan deziron konfidi miajn pensojn kaj sentojn al papero kaj... tempo. Mi skribas pri tio, kion vi neniam estus supozinta, kion vi eksciinte eble primokos...»

Li legis, legis kaj ju pli li legis, des pli ŝanĝiĝis lia aspekto. Nun li sidis pli rekta, liaj manoj ne tremis plu kaj la vizaĝo kvazaŭ juniĝis.

Li finis.

Nun li prenis telegrafmandaton kaj skribis sur ĝi kelkajn liniojn. Li legis ilin.

Subite akra podagra doloro trapikis lian kruron. Li kvazaŭ aŭskultis tiun doloron, sulkiginte la frunton. Kvazaŭ li aŭdis en tiu doloro ion... iajn superaĵajn argumentojn...

Malrapide, aŭtomate malleviĝadis lia mano kaj poste la telegrafmandato glitis el ĝi en la fajron de l' kameno.

Ĝi kunvolviĝis, ekbrulis, cindriĝis. Aerfluo kaptis la cindron kaj lude turnante forportis...

E. AISBERG

Premiita en la XII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.



## Komitato por Kataluna Antologio

La "Komitato por Kataluna Antologio" sciigas al la subskribintoj de akcioj, ke ili povas reenspezi 40% de la subskribita sumo, laŭ la artikolo IX-a de la Regularo.

Samtempe la Komitato sciigas, ke estas venditaj jam 420 el la 500 ekzempleroj eldonitaj, kaj espereble baldaŭ povos esti redonata la tuto de ĉiu akcio.

EDUARD CAPDEVILA, KASISTO

## La literaturo kaj lingvo de Irlando (1)

La granda paradokso de la 19<sup>a</sup> jarcento estis la tendenco al unueco de civilizacio, scienco, kaj arto, samtempe kun tendenco al multobliĝo de lingvoj.

Multaj ŝajne mortontaj lingvoj inspiriĝis per nova vivo. Kaj la granda milito donis al ili fortan antaŭenpuŝon, ĉar ĝi pretekstis esti pro la profito de malgrandaj nacioj, por doni al ili memstaron kaj liberecon.

La ĉefa signo de individua nacio estas aparta lingvo. Ĉiu malgranda nacio parolanta kaj uzanta ĉiutage lingvon de granda nacio, pli-malpli frue malaperos, ĉar kiam ĉiu el ĝiaj nacioj povas uzi la lingvon de la granda nacio, tiam ĝia propra lingvo estas nebezonata kaj baldaŭ okupas lokon de dialekto aŭ kampara ĵargono, malestimata de kleruloj.

Kun la subiĝo aŭ malapero de la propra lingvo, velkas ĝiaj propraj kutimoj, moroj, pensmanieroj, kaj ĝi ĉesas havi apartan, individuan, vivon.

Inter la reviviĝintaj lingvoj estas la irlanda lingvo. La konata angla ekonomiisto, Norman Angell, bedaŭras tiun reviviĝon. Li opinias, ke ideoj valoras pli ol la vortoj, kiuj esprimas ilin, kaj multobliĝo de lingvoj malfaciligas internacian interkomprenon.

Li estas aferema homo kaj forgesas la emocian flankon de lingvo. Profesoro Meillet, en sia verko, «Les langues dans l'Europe nouvelle», komprenas tiun flankon, dirante, «La langue est le premier, le plus clair, et le plus efficace des caractères, par lesquels se distingue une nation». (La lingvo estas la ĉefa, la plej klara, kaj plej efika el la karakterizaĵoj per kiuj nacio distingiĝas).

Tamen, eĉ se la irlanda lingvo ne sukcesos plene restariĝi, ĝi almenaŭ estas tre alloga al filologoj kaj historiistoj. Darmesteter diris, «Irlando havas la apartan privilegion de historio kiu daŭris seninterrompe de plej frua epoko ĝis nun. En ĝia senfine riĉa literaturo estas konservita, kompleta kaj fidela bildo de antikva kelta civilizacio. Tiu literaturo estas la ŝlosilo, kiu malfermos la keltan mondon».

Do ĝi ne nur lumigas antikvan Irlandon, sed ankaŭ tiujn partojn de Eŭropo, kie keltoj starigis koloniojn. La ĉefaj antikvaj historiistoj estis Grekoj kaj Romanoj, kiuj malestime rigardis la ceterajn naciojn kiel barbarojn. La studento, pere de irlandaj historioj kaj romanoj, ricevos alian normon por juĝi la morojn kaj kapablojn de tiuj grandaj popoloj, kiuj loĝis en la antikva Gaul, Belgujo, norda Italujo, Katalunujo, kaj partoj de Svislando, Germanujo, Aŭstrujo, kaj Britujo, popoloj kiuj batalis sukcese kontraŭ Grekujon kaj Romon, kaj koloniis Malgrandan Azion.

---

Noto de la R. Pro manko de supersignitaj konsonantoj kelkaj vortoj en irlanda lingvo estas kripligitaj.

La unuaj manuskriptoj estis precipe genealogioj, ĉar sub la kelta sistemo, neniu povis posedi landon se li ne estis el sama gento kiel la gentestro. Do ĉiu zorge konservis sian genealogion. La «Kroniko de Ulster» enhavas irlandan historion, komencantan en la jaro 444 P. K., kvankam la manuskripto nur datiĝas de la 15<sup>a</sup> jarcento. Tamen, en la «Kronikoj» troviĝas 18 datoj de eklipsoj kaj kometoj inter 496 kaj 884 P. K., kiuj akordiĝas precize kun la rezultoj atingitaj de modernaj astronomoj, do sendube ili estis notitaj de samtempuloj, ĉar la horo kaj tago de la fama suneklipso de 664 estis ĝuste notitaj en tiuj «Kronikoj», kvankam la verkisto, Venerable Bede, kiu naskiĝis nur 11 jarojn post tiu okazintaĵo, donis en sia libro, daton malfruan de du tagoj.

La «Libro de Kells» estas mirinde bela kopio de la «Kvar Evangelioj». Ĝi estis forŝtelita en 1006 P. K., sed poste ĝi estis retrovita sen ĝia ora kovrilo kaj kelkaj paĝoj. Tricent tridek naŭ velenaj folioj ankoraŭ restas, plej artiste ornamitaj per riĉa desegnaĵo unika en la mondo. Ĝi troviĝas en Trinity Kolegio, Dublino.

En la sama urbo, en la biblioteko de la Irlanda Akademio, estas katalogo de ankoraŭ ekzistantaj manuskriptoj, kaj la katalogo mem ampleksas dek-tri volumojn de pli ol trimil paĝoj. Multaj manuskriptoj estas kopioj de pli malnovaj verkoj, kiuj aŭ perdiĝis aŭ estis detruitaj. Laŭ la «Libro de Cashel», Sankta Patriko bruligis 180 volumojn de antikva irlanda teologio, kaj skandinavaĵoj invadintoj detruis multajn manuskriptojn.

Kiam Eŭropo kuŝis sub la mallumo de feŭdalismo, kaj preskaŭ nenie la greka lingvo estis konservita, irlandaj kleruloj parolis kaj instruis ĝin, kaj ankaŭ hebrean lingvon. En la 9<sup>a</sup> jarcento, Johano Scotus Eriqena, estis la sola persono kiu povis traduki la grekan verkon de Dionysius. Alia Irlandano, Diceuil, en 825 P. K., mezuris la Piramidojn tiel precize, ke liaj mezuroj tute akordiĝis kun la mezuroj de franca esploristo en la 19<sup>a</sup> jarcento. Li vizitis kaj priskribis Islandon, preskaŭ cent jarojn antaŭ ol Skandinavoj ĝin vizitis. En 814-6, li verkis astronomian verkon ankoraŭ ne publikigitan.

Multaj verkoj estas en bibliotekoj de kontinentaj urboj, en Milano, Cambrai, Louvain, kaj aliloke, ĉar la normanda invado en la 12<sup>a</sup> jarcento ĉesigis la laboron de la irlandaj verkistoj kaj kopiistoj. La monaĥoj forkuris al la kontinento, portante multvalorajn verkojn kaj rifuĝis en monaĥejoj. Metalaj ornamaĵoj kaj ĉiuspeca arto ĉesis dum 7 jarcentoj.

En la 16<sup>a</sup> jarcento kaj poste, granda mallumo restis sur Irlando. Instruistoj kiuj uzis la irlandan lingvon por instrui, estis punitaj kaj malliberigitaj; la posedantoj de manuskriptoj aŭ libroj estis malliberigitaj, kaj kelke da ili estis eĉ mortigitaj. Do ili enterigis siajn trezorojn en la teron, aŭ kaŝis ilin en murtruoj. Infanoj povis lerni nur el la lipoj de siaj patrinoj, aŭ de la tomboj de siaj praaĵoj, ĉar neniu povis verki tiacirkonstanco. Vere estas mirinde, ke la lingvo sukcesis vivi ĝis nun. Tamen, pro manko de interparolado kaj interkomunikiĝo, ĝi disfalis en dialektojn kun multaj malsimilaĵoj, vortoj malaperis, kaj pro manko de presita lingvo, la skribita kaj pa-

rolita lingvo grade diversiĝis. Lastatempe, la Irlanda Ligo faris sian eblon por kuraĝigi lernantojn, por provizi vortarojn, lerno — kaj legolibrojn, gramatikajn verkojn kaj novan literaturon. Ja estus monda perdo se tiu lingvo pereus antaŭ ol ĝiaj antikvaj trezoroj estus konataj de la mondo.

Kelkaj filologoj opinias, ke la irlanda alfabeto estis pruntita de la latina, sed se S.<sup>a</sup> Patriko efektive bruligis dokumentojn tio pravas ke la Irlandanoj povis skribi antaŭ la alveno de la Romanoj.

La alfabeto havas nur 18 literojn; kelkfoje ĝi estis nomata la «Bet-lúis-nuin», pro la komencliteroj, kiuj antaŭe estis B, L, kaj N. Alifoje ĝi ricevis la nomon, «Arbo de Scio» ĉar ĉiu litero estis nomo de arbo, alia pruvo ke la irlanda alfabeto estis pli malnova ol la latina, ĉar la literoj de la lasta ne estas latinaj nomoj de arboj. Jen la alfabeto: —

B	—	Beit	(betulo)
L	—	Lúis	(sorparbo)
N	—	Nuin	(frakseno)
S	—	Suil	(saliko)
F	—	Fearn	(alno)
H	—	H-uat	(kratago)
D	—	Daiz	(kverko)
T	—	Teitne	(ulekso)
C	—	Cole	(avelo) ĉiam havas sonon k.
M	—	Muin	(vinberujo)
G	—	Gort	(hedero)
P	—	mola B.	
R	—	Ruis	(sambuko)
A	—	Ailm	(abio)
O	—	Onn	(genisto)
U	—	Ur	(eriko)
E	—	Egad	(tremolo)
I	—	Ioda	(taksuso)

kvankam la alfabeto havas malmultajn literojn, ĝi havas pli da sonoj ol iu eŭropa lingvo krom rusa. Ĉiu konsonanto havas almenaŭ du sonojn, larĝan kaj mallarĝan, laŭ la vokalo kontaktanta kun ĝi. Aliaj sonoj produktiĝas per akcentoj, superpunktoj kaj eklipsoj.

La litero h estas uzata por moligi la kuniĝon de vortoj kiam du vokaloj kontaktas, ekz.: «is ead» sed «ní-head». P. estas trovataj ĉefe en enkondukataj vortoj, ĉar vortoj komenciĝantaj per p aŭ f en aliaj lingvoj ofte komenciĝas per c en irlanda lingvo, ekz.: Cásc, (Pasko; france, Pâques); Cos, (piedo; greke, pous); Céol (muziko; angle, peal, sonorilmuziko); Ceitre (kvar; kimre pedwar: angle four); Cúig, (Kvin; kimre pimp; angle, five); Ceann, (Kapo; kimre, pen); Corcur, (purpura; angle, purple) Clum, (plumo; angle, plume).

La nomoj de la numeraloj similas al esperantaj nomoj, aon, dó, trí, cei-



tre (aŭ ceatair), cúig, sé, seacht, oĉt, naoi, deich, sed la sekvantaj numeraloj ne nomiĝas laŭ esperanta kutimo. La unuo venas antaŭ la deko, ekz. aon-déag, (dek-unu); dó-déag, (dek-du) kc. Dukek estas fiĉe, kaj cent, céad.

Specialaj numeraloj estas uzataj por kalkuli personojn, duine, (unu persono), beirt, triur, ceatrar, kc. kaj estas strange ke anstataŭ «sep» oni diras «móir-šeisear», kiu signifas «granda ses».

La gramatiko estas malfacila; la substantivo havas kvin deklinaciojn kaj la adjektivo, kvar; ambaŭ havas kvin kazojn. La voka kazo estas ĉiam uzata por paroli al persono per la nomo. Parolante *pri* persono nomata Johano, oni nomas lin Seán (Ŝon), sed parolante al li, oni uzas la vokan formon, A Šeáv (Hon). En anglaj romanoj pri Irlando, oni trovas Shamus'n kaj Hamish'n, la nominativajn kaj vokajn formojn de Jakobo, respektive Séamus kaj Šeamuis. Substantivoj kaj pronomoj havas nur du seksojn, virseksan kaj virinseksan, rilatantajn ne al persona sekso, sed al vortformo. Cailín (knabino) estas virseksa, sed litir (letero) estas virinseksa.

La multnombro ne formiĝas per aldono de s, sed precipe per vokala aldono aŭ interna ŝanĝiĝo, ekz.: cailín, (knabino) cailíni; buacaill (knabo) buacailli; scian (tranĉilo) sceana; lám (mano) láma; sliab (monto) sléibte; bád (boato) báid; fear (viro) fir; duine (persono) daoine; mí (monato) míosa. Post la numeralo dá (du) la substantivo estas dunombra, ekz.: lám (mano); dá lám (du manoj); sé láma (ses manoj). Kutime la adjektivo sekvas la substantivon kaj akordiĝas, bean mór (granda virino); na fir móra (la grandaj viroj). Simile al Esperanto, irlanda lingvo havas nur unu artikolon, «an» (la) sed tiu havas multnombran formon, «na»; «an cuám» (la ostoj), «na cuáma» (la ostoj).

La pronomoj iom similas esperantajn pronomojn; mé, (mi) tú (ci), sé (li), sí (ŝi), sinn (ni), sib (vi), siad (ili). Sendube, multaj personoj konas la nomon «Sinn Fein» donatan al irlandaj respublikanoj. Ĝi signifas «ni mem», kaj esprimas la deziron de la respublikanoj «ellabori nian propran liberigon, ne apogante nin sur aliajn personojn aŭ naciojn».

La demandaj vortoj precipe komenciĝas per la k-sono reprezentita en irlanda lingvo per c; cé (kiu); cad (kio); cé leis, (kies); catain (kiam); cá (kie); cad na taob (kial). Por simplaj demandoj la vorto «an» (ĉu) estas uzata sen ŝanĝo de vortordo, ekz.: «is fear é» (li estas viro) «an fear e?» (ĉu li estas viro?).

«Jes» kaj «ne» ne troviĝas en irlanda lingvo, demando devas esti jesata aŭ neata per la verbo uzata en la demando, do la respondo estas tre preciza, ekz.: «An dtiguim tú an ceist?» (Ĉu vi komprenas la demandon?) povas esti respondata: — «Tiguim» (mi komprenas) aŭ «Ní tiguim» (mi ne komprenas). Se oni demandas, «An maít leat caife?» (ĉu plaĉas al vi kafo?) la respondo estas «Is maít liom» (Ĝi plaĉas al mi) aŭ «Ní maít liom» (Ĝi ne plaĉas al mi).

«Se plaĉas al vi» estas preskaŭ la sama frazo «má 's é do toil é» (se tiĝo estas via volo) kaj «dankon» estas esprimata «go raib maít agat» (estu

bone al vi). Nek participojn estantaj nek sendifinan modon havas irlanda lingvo. Verbsubstantivo estas uzata anstataŭ ili. Mankas ankaŭ la verboj «havi», «porti» kaj «bezoni», kaj iliaj sencoj devas esti esprimataj de prepozicioj. «Nora havas katon» tradukiĝas «Tá cat ag Nora» (Estas kato ĉe Nora). «Mi portas veston» estas «Tá cóta orm» (estas vesto sur mi). Sentoj esprimiĝas same; «mi malsatas» estas «Ta ocras orm» (estas malsato sur mi). Tiamaniere povas esti esprimataj, ĝojo, kolero, honto, kaj aliaj abstraktaĵoj. Por esprimi bezonon, la prepozicio «ó» («de» aŭ «for de») estas uzata. «Bí leabar uaim» (estis libro for de mi) signifas «mi bezonis libron».

Kunmetitaj vortoj troviĝas, ofte kun poezia nuanco. «Strigo» estas «ceanncait» (kapo de kato); «sciuro». «catcrainn», (kato de arbo); «vagonaro», «cóiste-iarainn»; (veturilo el fero) «fervojo», «botar-iarainn», (vojo de fero); «telegramo», «teačtaireačt-teinntig» (venanto de fulmo); «fulmo», «teinntreač» (fajra laŭco).

Multaj anglaj vortoj venis el kelta lingvo, ekzistantaj flanke kun similsignifaj vortoj el saksa aŭ normanda lingvo. El tiaj paroj la unua venas el kelta fonto, la dua el saksa aŭ normanda. Tongue, language, (teanga, lingvo); dun, brown, (donn, bruna); means, riches, (maoin, riĉeco); shuffle walk. (siubal, promeno); kin, relations, (cinead, tribo) caper, leap, (ceáprairra, ni saltas); espouse, marry, (pósad, edziĝo); quay, pier, (céad, kajo).

Ankaŭ vortoj tre similaj al esperantaj vortoj troviĝas en irlanda lingvo, ekz.: anam (animo); or (oro); airgead, (argento); capall, (ĉevalo); olann, (lano); mil, (mielo); buaf, (bufo); seagal, (sekalo) ionga (ungo); tir, (tero); seačt-main, (semajno); Dia luain (lundo); Dia máirt (Mardo); Eanair (Januaro); Feabra, (Februaro); Iúl, (Julio),

Do oni konstatas, ke multaj ligiloj ekzistas inter tre malnova irlanda lingvo kaj tiuj de antikva kaj moderna Eŭropo, inter ili ni povas enkalkuli Esperanton, la plej moderna el ĉiuj.

Ĝi estas taŭga lingvo por kantado, ĉar ĝi estas belsona kaj harmonia. Malmolaj konsonantoj estas moligitaj per superpunktoj kaj eklipsoj ekz.: «píopa» (pípo) kun superpunkto moliĝas al «píopa» (fípa); «síoda» (síko) iĝas «síoda» (hida). «Go deo na ndéor» (por ĉiam) per eklipso de malmola «d» iĝas «go do na nor».

La poezia sento de la Irlandanoj montriĝas en la nomoj donitaj de patrinoj al iliaj infanoj, «mo ĝile» (mia brilereto); «a leinb mo ĉroide» (infano de mia koro); «a stóirín mo ĉroide» (trezoreto de mia koro); «a cuisle mo ĉroide» (vejno de mia koro); «mo ĉuid de 'n tsaogal» (mia porcio de la mondo).

Kelkaj personoj erare kredas, ke la irlanda lingvo estas nur dialekto de la angla, do mi citos frazojn el la preĝo de nia Sinjoro, «Patro Nia», en ambaŭ lingvoj por komparo.

Irlande: «Ár n-Atair abá ar neam; go naomúigtear t-ainim; go dtagaid do rígeačt; go ndéantar do toil ar an dtalam mar a déantar ar neam» kc.

Angle: «Our Father which art in Heaven; hallwed be Thy name; Thy Kingdom come; Thy will be done on earth as it is in Heaven», kc.

La Irlandanoj nomas sian landon «Éire», nomo simila al la persa nomo por Persujo, Iran; sian lingvon ili nomas «Gaedilge», aŭ «An teanga na h-Éireann».

Ĝi estas vera orminejo por filologoj, ĉar ĝi estas la plej malnova lingvo de civilizacio, daŭranta de tiuj antikvaj tempoj, kiam Romanoj venantaj al Britujo por venki ĝin, traktis kiel amikojn la Irlandanojn

La angla lingvo estas miksaĵo el multaj lingvoj, sed la irlandano estas preskaŭ la sama kiel en tiu antikva tempo, la aspekto de la vortoj ne multe ŝanĝiĝis nur la elparolo aliĝis.

Tiu lingvo postvivanta spite teruraj kontraŭstaroj, havanta propran literaturon kaj povon por esprimi la nuancojn de penso kaj necesojn de moderna vivo, ne facile mortos. Sed se tiu barakto por vivo havos sukceson aŭ ne, dependas sur la alprenado de dua lingvo por eksterlandaj aferoj. Tiu dua lingvo devas esti Esperanto, la jam plene disvastigita internacia lingvo.

EMMA L. OSMOND

Premiita en ia XII Internaciaj Floraj Ludoj.



## XIV Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio

Sóller: 5, 6, 7 junio 1927

Niaj okuloj ankoraŭ ne rekonsciiĝis de la brilo kaj belo de nia Kongreso en Palma de Mallorca kaj jen denove niaj kunbatalantoj transmaraj, sur la Orita Insulo, invitas nin por ĝui la nesupereblan pejzaĝon de Sóller, la Meko de nia lando.

Senhezite ni povas aserti, ke nia XIV Kongreso ne povus trovi pli belan lokon, pli riĉan lulilon. Sóller, kun la blua maro ĉe siaj piedoj kaj la imponaj altaj montoj gardostarantaj ĉirkaŭ ĝi, altiras ĉiujare grandan nombron da turistoj, kiuj el ĉiuj kontinentoj alvojaĝas al la hejmo de la naturo por ĝui altgrade la nektaron de la plej dolĉa floro.

Kiom da pentristoj pentris vin, Sóller! Kiom da poetoj kantis viajn diverskolorajn oranĝarbojn! Kiom da esperantistoj admiras vin dum la XIV Kongreso de K. E. F.!

Se ni iam povis konsili niajn amikojn, neniam ni tion faris tiel prave kiel hodiaŭ: ŝparu, komencu kolekton en viaj grupoj, prunteprenu aŭ eĉ trompu monhavanton, sed neniel preterlasu la okazon viziti Sóller!

Esperantista Grupo «Sollerica», kiu kun entuziasmo komencis la unuajn

paŝojn por sukcesigi la Kongreson, invitas la katalunajn esperantistojn al la granda Festo. Ĝi esperas, ke la ĉarmo de la lando altiros esperantistojn el diversaj nacioj, kiuj donos reliefon al la Kongreso.

Estis elektita la jena Organiza Komitato:

S-ro. Narciso Bofill. . . . .	Honora prezidanto
» Miquel Arbona . . . . .	Prezidanto
» Andreu Comellas . . . . .	Kasisto
» Andreu Arbona . . . . .	Sekretario
» Bartomeu Coll. . . . .	Voĉdonanto
» Francesc Colom . . . . .	»
» Jaume Coll . . . . .	»
» Sebastià Terrassa . . . . .	»

Por la sukceso de nia estonta Kongreso ĉiuj K. E. F-anoj konstante laboru. La diversaj amikoj, kiuj prenis sur sin la taskon de organizo, garantias ja kontentigan rezulton.



## Alvoko por la XIII<sup>aj</sup> Internaciaj Floraj Ludoj

kies solena festo okazos kun la XIV Kongreso de K. E. F.

Antaŭ du jaroj estis Palma de Mallorca, la ĉefurbo de la Baleara Insularo, la scenejo de nia granda solenaĵo. En 1927 estos ne la plej granda, sed jes la plej bela urbo de tiu belega katalunlingva teritorio, nia poezia kunvenejo: Sóller.

Al vi, Esperantaj verkistoj, inspiruloj el ĉiuj landoj, saluton! kaj inviton partopreni la jenajn konkursojn:

### ORDINARAJ TEMOJ

#### ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Proza *Ama* verkaĵo.

#### TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Esperantigo de la jena kataluna versaĵo:

### Record de Sóller

Amic, teixiu aquesta visió de la infantesa...  
Ja coneixeu la vila d'ombrívols carrerons,  
la rica vall de Sóller, entre serrals estesa,  
on totes les vivendes tenen un hort al fons.



Era senyor de casa el somni de la sesta;  
la posadera em feia senyal de que emmudís,  
posant-se el dit als llavis; una verdor xalesta  
pel portaló guaitava com auri paradís.

L'hort m'oferí refugi, dosser la verda branca  
del taronger; en l'herba me vaig tombar; l'eixam  
d'insectes, com espurnes, brunzia per la tanca,  
i em feia pessigolles al front l'espès herbam.

Eren les verdes tiges profunda columnada;  
filtrava, ran de terra, l'esguard per allà endins;  
dansaven les corol·les de fulla acarminada,  
com baiaderes entre pilars esmaragdins.

Llavores un misteri per mi se va descloure,  
torbant la fonda calma del cor adolescent:  
entrà una joveneta amb els cabells a lloure,  
que un raig de sol feria com nimbe resplendent.

Amagatall cercava per treure's una pua  
del cos; a totes bandes girà l'ull inquiet;  
s'alçà la falda roja, mostrà la cama nua  
que més amunt tenia una blancor de llet.

Mon cor, davant la casta nuesa, va suspendre  
son ritme; una calrada bullenta vaig sentir;  
l'esglai que sentiria la bergantella tendra  
que es creia tota sola, si s'adonés de mi!

I el nin va tornar home... Quin esperit dins una  
espina de figuera de moro va saltar  
a l'abscondit ivori de l'Eva, tan dejuna  
de dar-me el fruit de l'arbre simbòlic a flairar?

Mai més l'he retrobada; i veig com aquell dia,  
fa quaranta anys, la nina que no em coneix tampoc,  
i el món d'una edat nova, inconscient m'obria,  
incendiant la porta sense percebre el foc.

Amic, teixiu aquesta visió de la infantesa,  
vós que caceu libèl·lules en la presó del rim,  
vós que preniu les ales amb tanta subtileza  
que no se perd un àtom del matisat polsim.

JOAN ALCOVER

---

Tiu çí numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

## II. — Esperantigo de la jena kataluna prozaĵo:

## Ramon de Montjuic

La tràgica mort del meu amic Ramon, ciutadà de la falda nord de la muntanya de Montjuic—la que toca al Poble Sec,—m'ha emplenat de tristesa i m'ha recordat una època de la meua vida. Ramon, el mort, tenia un petit parc d'atraccions format per un carroussel i una barraca de pim-pam-pum. A l'estiu el parc funcionava i a l'hivern, la màgica potència de transformació del propietari, convertia el parc, en saló de ball de tarda. Tot el tinglado ocupava el fons ombrívol d'un hort d'un dels carrers del Poble Sec que s'enfilen a la muntanya.

Ramon era un amic del diumenge. A l'hivern, en aquella època, havent dinat, anava gairebé cada festa al suburbi. El Poble Sec, en aquella hora era ple de clapes de silenci i de grans taques de sol tebi i feia olor de taronges. De vegades se sentia, darrera d'una cantonada, un xivarri de mainada. Les tavernes, semblaven eixams sonors, amb la sonsònia de les guitarres. El tocador, ensenyant el mitjó vermell, el cigarret darrera l'orella, amb un rínol de cabells caragolats com una neula sobre el front, es rodejava de la rodona de les boques mig obertes de les criades.

Recordo, com si fos ara, la veu de xantre d'un cec vell amb barba, molt alt, que anava pel Poble Sec cantant la cançó del naufragi del "Valbanera". Els veïns sortien als balcons per sentir-lo, les dones, en faldilles de sota, els homes, amb la bata groguenca del magatzem. Quan el cec passava per davant de les tavernes trepitjava les closques de cacauets i com que aquella fressa no li devia agradar saltava com un ocell, per passar de pressa. A les portes de les tavernes hi havia sempre algun obrer jove, figura oblíqua, amb el vestit blau planxat, la gorra de gran visera una mica de cantó, un clavell a l'orella, indiferent, amb una mica de crueltat de gall als llavis. També hi havia braçades de noies castellanés, amb la cara de color de poma, amb els cabells negres planxats, mullats i ondulats. Aquestes noies de vegades donaven empentes als soldats petits, xafats i xatos que menjaven peles de taronja i cloves de cacauets.

Es trobaven, molts esguerrats i pobres i en certs llocs feien una mena de barricada amb les crosses, els ossos torçats, els bastons i els altres instruments dels pobres.

Preniem la carretera de Montjuic, donàvem una volta pel corriol que volta els glacis, ens assèiem per veure el cel, que era blanc de núvols i tenia trossos mig blaus, mig verds, mig rosa i després, amb un bri de farigola als llavis, el cor i el cap a qualsevol banda, les mans a les butxaques, passant pel camí del primer parc de Montjuic arribàvem al farbalà de la muntanya. I sovint entràvem a donar un cop d'ull en el ball de tarda del pobre Ramon.

Hi entràvem amb una certa prevenció perquè l'aire interior, molt espès, feia girar la cara i la llum era incerta. Quan els ulls s'hi acostumaven, es

veia al centre de l'envelat, un quiosc quadrat format per quatre pals rodejat d'una tela metàl·lica de galliner. Dintre d'aquella gàbia posada en aquell mar de fum, hi havia tres músics una mica boirosos arrapats als seus instruments com si fossin els seus salvavides. La llum del gas treia del metall daurat d'un fiscorn un reflex somort. En el fons es veia dins d'una atmosfera de teló de fons capvespral, els cavallets enfundats. Entre aquell grandió embalum i la tela de l'envelat del ball hi havia com una gran esquerda que deixava veure les estrelles.

Quan els músics no sonaven hi havia a l'envelat una remor espessa. De vegades entre aquell formigueig gros de color de xocolata a l'espanyola es disparava el xisclet d'alguna noia, com si li hagués fugit una molla. Les criatures jugaven a cuït entre les cames dels balladors i de vegades en rodaven tres o quatre, com una bola, per terra. Sempre hi havia asseguda a les cadires alguna mare que donava el pit al fill. El color desfet, afinat, treballat, ple de filagarses d'aquestes mares, en aquella llum, em feia pensar, no sé per què en la pintura de Sisley.

Ramon portava sempre una canya a la mà amb la qual graduava els becs de gas i els treia el moc. S'escorria com una anguila, era a tot arreu, cridava amb els músics, deslligava dubtes, feia circular la tossa de gent que hi havia a la porta.

La música, més que sonar, de vegades gemegava, de vegades bramava. Era una música biològica que arribava al fons de les vísceres. Quan s'arrencava, es formava a l'entorn de la gàbia una argolla humana, grossa, multicolor, canviant, com si bullís. Els dies de gran festa sorgia per sobre del cap de la gent el plomall d'algun soldat, i semblava la maneta de l'argolla. Els llums de gas, amb la pols, enrogien, el baf era una cosa granulada i l'aire es poblava de petits granets de pus.

Ramon era un home petit, sec, calb, amb unes celles peludes i amples. Portava coll planxat de goma i punys rodons, de cel·luloide. Es veia que l'il·lusió d'aquell home hauria estat la d'ésser un mig artista, perquè es deixava créixer les ungles, deia les coses a la babalà i tenia certes caigudes en el dandisme: per exemple, era partidari de l'armilla de fantasia. Tot aquest corrent de la vida espiritual de Ramon desembocava en la seva passió per l'anar a pescar amb canya a l'escullera, cosa que l'encantava.

Ramon era una pelleringa humana que solia amagar darrera d'una aparença decent la seva enorme ganduleria. En el fons era, el que en diuen els bons escriptors, un incomprès. Allò per exemple de tenir una ocupació la del ball,—el dia que tothom fa festa, trobava que era la demostració de la seva superioritat

Ramon vivia en els cavallets. A la baldufa, hi tenia la cuina. En el ventre d'un dels cavalls de cartó d'aquells que puguen i baixen hi tenia el rebost. Penjava la roba a les trompetes de les nimfes de l'orgue de vent. A la cadira portàtil engarlandada de roses—aquesta cadira que usen en els cavallets (les mares de les criatures,—hi rebia la gent. En aquella mena de sot circu-

lar que hi ha entre l'arbre central i l'armatosta circular que gira, hi tenia quatre caixes petites i miserables, amb quatre sabates velles i unes canyes de pescar.

El més original, era el dormitori, Ramon es colgava dins de la manxa de l'orgue dels cavallets. La manxa estava unida als cavallets per un engranatge i una politja. Quan els cavallets voltaven la manxa s'inflava i desinflava. La manxa tenia la forma de piràmide truncada quan era plena de vent, era una mena de boca de granota amb una ànima de ferro, recoberta de cuiro i corria horitzontalment a la part del darrera del fris de nimfes i ballarines que tenen una daurada trompeta de cartó a la boca i unes galtes inflades.

Recordo que un dia vaig fer veure a Ramon el perill que representava dormir dintre d'aquell cau.

—Un dia els cavallets, sense saber com, es posaran a rodar, la manxa es comprimirà i morireu fet una truita. Sort però, li vaig dir rient, que mentre aneu quedant planxat com uns pantalons, sonaran totes les trompes destrepades de les nimfes i ballarines.

—No deixa d'ésser una mort agradable—digué ell amb la vanitat infantívola que tenen tots els artistes quan se'ls parla de les seves rareses, gratant-se amb la llarga unglà groga del dit petit les arrugues del front i l'espessor bosquetana de les celles.

Quan he sabut la mort de Ramon he anat al parc d'atraccions. He entrat a l'hort. No hi havia ànima vivent. Ja me n'anava quan he vist venir una dona amb un sac de papers a l'esquena, una faronja a la mà.

—Ahir el varen enterrar—digué la dona.—El varen treure mort de la manxa...

—I de què ha mort?

—Ningú ho sap. Abans d'ahir encara va anar a l'escullera i avui ja fa malves.

—Vostè és del barri?—vaig preguntar a la dona.

—Sí, per què?

—No varen sentir els veïns el soroll de les trompetes dels cavallets la nit que va morir?

—Em sembla que he sentit a dir alguna cosa d'això... que és policia vostè?

Petita pausa. Després,

—Tenia enemics el senyor Ramon?

—Jo no sé però, qui sap!

—Potser algú de l'escullera, no us sembla?—he dit jo per dir quelcom.

—Era un fracassat—ha dit la dona amb incoherència:—Figuri's que en els baguls no se li ha trobat ni un tros de paper.

—Vós colliu papers pel carrer, no fa?—he dit sense alçar el cap.

—Sí, senyor, per què?

Una altra petita pausa. Amb el meu prim bastó de nusos remoc un xic de terra i amb la virolla toco una pedra blanca i neta.



—I a l'enterrament, hi havia molta gent?—he fet, distret.

La dona m'ha mirat, se li han deslligat les faccions, no s'ha pogut tenir el riure i després ha començat a pelar la taronja.

He mirat la dona una mica perplex. M'he adonat que he fet una planxa. Pensava en el darrer enterrament que m'han parlat que fou molt concorregut. Li he dit:

—Dispensi.

I ara un pas, ara l'altre, he sortit al carrer. — JOSEP PLA.

### EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de Esperantista Grupo «Solleric», Sóller,: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II. — Premio de Sro. Narciso Bofill, Palma: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- III. — Premio de la Komitato de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV. — Premio de *Kataluna Esperantisto*: Dumviva abono al la gazeto. Temo: Pri la natura evoluo de Esperanto.
- V. — Premio de la Prezidanto de K. E. F.: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI. — Premio de la Direktoro de K. E.: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VII. — Premio de Sro. Jaume Grau Casas, Barcelona: 50 pesetoj. Temo: Studo pri la lingvo kaj literaturo de iu malgranda popolo.
- VIII. — Premio de Esperantista Klubo Palma: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola. Novaj premioj estos anoncataj al la Komitato, kaj ni ilin publikigos en la proksimaj numeroj de «Kataluna Esperantisto».

(Ni petas ĉiujn societojn kaj privatulojn bonvolajn, tuj anonci al ni siajn premiojn kaj temojn por la proksimaj Floraj Ludoj.)  
Inspirigu kaj verku por la gloro de nia Literaturo!

JAUME GRAU CASAS, *Prezidanto*. — FRANS SCHOOF. — JOSEP CASANOVAS. — NARCIS BOFILL. — MARIAN SOLÁ — DELFÍ DALMAU, *Sekretario*

### NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II, ricevos ekzempleron de la verko «Kataluna Antologio». Krom tio estos donacata al ĉiu laŭreato atesta diplomo.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III. — La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj aŭ anoncintaj.

IV. — La soleno de la XIIIaj Floraj Ludoj okazos en Sóller dum la XIVa Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio».

V. — La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 28 februaro 1927 ĉe la Sekretario de la Floraj Ludoj, (S-ro. Delfí Dalmau, Carrer València, 245, Barcelona) akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — La manuskriptoj ne estos resendataj eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Ĉiu sendinto bonvolu konservi kopion de la manuskriptoj. La manuskriptoj devas esti skribitaj plej legeble sur unu

flanko (paĝo) de ĉiu paperfolio. Oni menciuj ĉiam ĉu la verko estas originala aŭ la lingvon el kiu oni tradukis.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII. — La Komitato publikigos la verdikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La verkoj premiitaj fariĝos propraĵo dum unu jaro, de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

*Peto al la gazetoj.* — Ni petas niajn kolegojn, ke ili publikigu nian alvokon por ke la konkurson partoprenu esperantistoj el la tuta mondo.

## Pro... kaj Por...

*XXXIX Datreveno de Esperanto.* — Paco kaj Amo organizis por la 8 de aŭgusto tre belan feston por soleni la XXXIX Datrevenon de la apero de la unua lernolibro de Esperanto kaj vere la organizintoj povas fieri, ke ilian meritan taskon kronis granga sukceso.

Ĉirkaŭ 150 esperantistoj kaj simpatiantoj kolektiĝis en la belega arbaro de St. Quirze, apud Sabadell, por ĝui la diversajn interesajn flankojn de la programo. Super ĉio meritas laŭdon la literatura festo, kiu disvolviĝis en libera aero, sub la foliriĉaj arboj. S-noj Gallego, Barba, Planas, k. a. alparolis la publikon, kiu dum la festo fariĝis multe pli nombra, kaj brave altigis la celon de nia movado kaj la ideojn, kiuj promesas feliĉon al la homaro.

*Nia amiko Gili Norta.* — Post unujara vojaĝado tra Ameriko, nia kara kaj laborema Gili revenis al nia rondo, sed bedaŭrinde lia restado ĉe ni ne daŭris pli ol du monatojn. La 24 de septembro, li denove enŝipiĝis kaj por longa tempo ree adiaŭis nin. Bonan vojaĝon kaj baldaŭnan revenon!

*El Monistrol.* — La 31an aŭgusto okazis en Monistrol de Montserrat la fermo de du Esperantaj kursoj, kiuj daŭris unu monaton kaj duonon. Klariĝo estis dum unu horo ĉiutage. En tiuj kursoj partoprenis 25 knaboj inter 10 kaj 13 jaroj. Rimarku, ke per nia sistemo, kiel dum la pasinta jaro, ĉiuj knaboj restis ĝis la fino de la kurso; nur unu forlasis ĝin. Bedaŭrinde, pro tio ke preskaŭ ĉiuj estas malriĉaj kaj tre junaj, oni ne povis organizi seriozan grupon kaj kolekti monon por aboni gazeton kaj aĉeti standardon, k. t. p. Ni atendas ke riĉuloj helpu nin. — Orobitg.

*Oni dankas.* — S-ro. Manuel Rodellar dankas la diversajn samideanojn, kiuj dum lia vojaĝo bonvolis akcepti kaj helpi lin. Li precipe dankas la delegiton de U. E. A. en Toulouse kaj la esperantistojn en Bilbao kaj Baracaldo, S-rojn. Elizondo, Lunate kaj aliajn, kiuj bonvolis lin akompani al «Altos Hornos», kie laboras multaj samideanoj.

## Nekrologo

Kun granda ĉagreno ni informiĝis pri la morto de nia samideano Ramon Guitart el Barcelona kaj Pere Llitas Ponsa, filo de nia kumbatalanto, Sro. Pere Llitas.

Al la familio de la malfeliĉe malaperintaj samideanoj ni devas esprimi nian plej profundan kondolencon.

# KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE  
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto»,  
València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu  
al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por  
eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio  
estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan  
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



## KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al  
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Ĉiusemajna  
Aktuala Ilustrita  
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de  
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo  
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.<sup>on</sup>, 2.<sup>a</sup>  
BARCELONA

## “Kataluna Esperantisto”

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO  
OFICIALA ORGANO

DE LA

## Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj  
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj presu.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj  
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en  
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-Barcelona

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anon-  
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi  
tekston publikigotan.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)*

## LA

artícle determinatiu

el, els  
la, les

## J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

sufix per al

femení

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

terminació  
substantiu

lakto  
urbo  
**komerco**  
(comerc)

## A

terminació  
adjectiu

blanka  
antikva  
**komerca**  
(comercial)

## I

terminació verb  
(infinitiu)

kompreni  
labori  
**komerci**  
(comerciar)

## E

terminació  
adverbial

klare  
konstante  
**komerce**  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

temps present

Mi skribas  
Jo esric

### IS

temps passat

skribis  
escriví

### OS

temps futur

skribos  
escriuré

### US

mode condi-  
cional

skribus  
escriuria

### U

mode impera-  
tiu o subjun-  
tiu

skribu  
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.  
*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo esric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro, per la plumo, sur la tablo.*